



The NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW

Vol. 2 No. 1

Official Organ of the Esperanto League for North America

Jan.-Feb., 1954

ESPERANTO—THE LANGUAGE AND THE MOVEMENT

Two recent events in this country are of particular significance to Esperantists. First, the U. S. State Department issued a reply to UNESCO's preliminary inquiry regarding Esperanto, which is on the agenda for that organization's forthcoming General Conference in Montevideo. The text of that reply is as follows:

"It is the view of the Department that it is not appropriate for UNESCO to sponsor and promote Esperanto or any similar auxiliary language. In the United States the teaching of Esperanto is a matter for decision by local school systems and it is, presumably, a matter within the domestic jurisdiction of other member states. Because of the demands already being made on UNESCO's resources, it is the further view of the Department that it would be unwise for UNESCO to embark upon further action or study on the subject of Esperanto or any similar auxiliary language, especially until UNESCO has done much more to solve the problem of illiteracy."

The significance of this unfavorable statement requires no editorial comment. It is to be hoped that a vigorous campaign to obtain signatures to the Esperanto petition, a copy of which is enclosed with this issue, will bring about a change in our Government's position before the UNESCO General Conference takes place late this year.

The other matter which we wish to bring to your attention is the appear-



Edward Kalmar and Joseph R. Scherer of Los Angeles. Read Mr. Kalmar's interesting story on page 3. (Photograph by courtesy of The Los Angeles Times.)

ance in *Life* magazine for Dec. 28 of an editorial in which Esperanto was referred to in a most unfortunate manner. Specifically, *Life* claims in the course of some remarks on Comte's "Religion of Mankind" that this is "no more a religion than Esperanto is a language."

Editors of large national publications like *Life* are generally assumed to be as well informed on almost any topic as anyone can be expected to be. Moreover, particularly in the framing of editorials of this kind, it is customary

to weigh carefully each word and to double-check any facts and figures used. It must be recognized that *Life* intended no attack on Esperanto; rather, the writer of the editorial chose what seemed to him a legitimate comparison to illustrate his opinion of the "Religion of Mankind". In other words, the editors of *Life* took so much for granted that Esperanto is something less than a language, within the accepted meaning of the word, that it

(Continued on page 12)

Published in Tacoma, Wash., by the Esperanto League for North America, Inc., as its official organ. Subscription free to members. Other rates:

NON-MEMBERS: \$1.75 per year.
 GIFT SUBSCRIPTIONS: *Members* may purchase gift subscriptions, at 30 cents per year, for schools, libraries, eminent persons, etc. The Review reserves the right to refuse gift subscriptions for persons who should pay the higher rate.

EXTRA COPIES (must be ordered before printing): 30 of one issue for \$1 to members only.

MEMBERSHIP DUES

Regular Member	\$3.00
Supporting Member	\$5.00
Patron	\$10.00
Life Member	\$50.00
Man and wife (Regular Members)	\$4.00

(to receive only one copy of publications, etc.)

Make checks and money orders payable to Esperanto League for North America.

Send all dues, subscriptions, changes of address, etc., to the General Secretary.

OFFICERS OF ELNA

President
 Gilbert Nickel, 204 Harding Avenue,
 Silverview 4, Del.

Vice-President
 John L. Lewine, 52 Riverside Drive,
 New York 4, N. Y.

General Secretary
 Louis Dormont, 123 East 35th Street,
 Brooklyn 3, N. Y.

Financial Secretary
 Conrad Fisher, R. F. D. 1
 Meadville, Pa.

Treasurer
 Edward W. Pharo, Jr., 638 E. Rosalie St.,
 Philadelphia 20, Pa.

Chairman, Executive Board
 F.R. Carlson, 2116 North 35th St.,
 Seattle 3, Wash.

Editor, Official Organ
 D. B. Richardson 6205 So. Prospect
 Tacoma 9, Wash.



IN THE U.N. ASSEMBLY

A Pole heard a Russian translation of a speech made in French by a Turk and he sighed, "If we'd use Esperanto it would save such a lot of hard work!"

COMMITTEES OF ELNA

Finance
 George E. Wagner, 403 E. North St.,
 Tampa, Fla.

Organization
 Armin F. Doneis, P.O. Box 105,
 Pharr, Texas

Roan Orloff, 31 Nahanton St., Box 18,
 Newton Center 59, Mass.

Publicity
 Helene Wolff, 2944 Clay St.,
 San Francisco 15, Cal.

Education
 W.G. Adams, Kingston, Wash.

G. G. Iggers, Philander Smith College,
 Little Rock, Ark.

John Bovit, 132 East Broad St.,
 Westfield, N.J.

Anyone who can help in the work of one of these committees, or who wants help on local problems, is requested to write to the first name listed under the committee concerned.



Petition Blanks Available

We now have 10,000 copies of the Declaration of support for the petition to the U.N. Let's get them all signed to show that Americans also realize the need for Esperanto. Bundles sent free on request. A \$5 book credit at the Esperanto League Book Service will be given to the person or club turning in the greatest number of signatures.

ESPERANTO LEAGUE'S BOOK SERVICE

Middleton, Wisconsin

Esperanto for Beginners, Butler	.10
Robbie's Home Student. (Recommended for quick course)	.25
Nelson's Esperanto Course, (Complete university grade grammar and exercise book. Highly recommended.)	1.50
Step by Step in Esperanto, Butler. (Equally good as Nelson's, but different in arrangement.)	1.50
Esperanto Grammar and Commentary, Cox. (Very good.)	1.50
Eng. - Esp. Vocabulary. (Not exhaustive.)	.05
Eng. - Esp. Keys. (Over 800 basic words. Good handouts.)	.05
Millidge Esperanto - English Dictionary	2.50
English - Esperanto Dictionary. Fulcher-Long.	2.35
Edinburgh Esp. Eng. - Eng. Esperanto Pocket Dict., highly recommended as a handy, dependable quick reference.	.85
Plena Vortaro. (Complete all-Esperanto Dictionary.)	4.00

RULINGS by the PRESIDENT

The Executive Board does not have authority to temporarily lower the dues for a membership campaign, as the dues are fixed by the Constitution.

DECISIONS of the ESTRARO

1. That the November Review be sent to the full mailing list.

2. Named S-ano Edward W. Pharo, Jr., to fill the vacant position of Treasurer of ELNA.

3. Named S-ano Conrad Fisher to fill the vacant post of Financial Secretary.

4. Named S-ano Roan U. Orloff to fill a vacancy on the Estraro.

5. Named S-ano Adrian Hughes to fill a vacancy on the Estraro.

6. Named S-ano Howard Borden as Local Congress Committee Chairman for the 1954 Congress.

Following is the list of nominees for offices of ELNA, chosen by vote of the nominating committee, for the election at the 1954 Congress:

President John L. Lewine
 Vice President James D. Sayers
 General Secretary Louis Dormont
 Financial Secretary Conrad Fisher
 Treasurer Edward W. Pharo

Estraro:

One year term George E. Wagner

Two year term Ray M. Pease

Three year terms John Bovit

Armin F. Doneis

Gilbert Nickel

Names proposed by any 10 members will be added to this list. Send nominations immediately to: J.E. Carpenter, 1537 37th St., Sacramento, California.

The Seattle Esperanto Society has purchased gift subscriptions to the 1954 Review for all public libraries and high schools in Seattle, the Superintendent of Schools, head of foreign language instruction in the schools, University of Washington, Seattle University, Seattle Pacific College.



Exposition at Seattle Library

Through the month of February, the Seattle Public Library is presenting a display of Esperanto books, etc., at the Central Library, 4th and Madison.

ESPERANTO IN NORTH AMERICA

News-notes from around the United States and Canada

Polish Esperantist in U. S. Says He Owes Life to Esperanto

(See picture on page 1)

In the last issue of the *Review* we mentioned briefly the appearance on a nation-wide TV program of Edward Kalmar, a Polish refugee now living in the United States, who explained how his life was probably saved because of his knowledge of Esperanto. Here is the full story of S-ano Kalmar's experiences.

From 1940 to 1945 Kalmar was kept prisoner by the Nazis in a concentration camp in Poland. Inmates were so poorly fed that most of them were eventually to die of starvation. It happened, however, that an Italian bricklayer was brought to the camp as a civilian employee. The Italian spoke no German, and the German camp officials spoke no Italian. So the Germans asked the inmates whether any of them could speak Italian and serve as interpreter. None could, but on a wild chance Kalmar came forward and spoke to the Italian — in Esperanto. It worked! The Italian was also an Esperantist, and Kalmar subsequently acted as interpreter, the Nazis never suspecting that the language the two spoke was not Italian. The bricklayer took care to see that Kalmar was supplied with enough food to escape starvation, until finally at the end of the war Kalmar was released and reunited with his wife, Rese.

In 1948, Kalmar learned that he was about to be arrested by the communist authorities in Poland. In a dramatic last-moment escape, Kalmar, his wife, and their baby son Franklin left Poland and found refuge in Sweden — again with the help of Esperantists with whom the family had been in correspondence. In Sweden their second child, Ernestine, was born.

Finally, after further correspondence with Joseph Scherer, of Los Angeles, the family came to the United States, where they are now living.

Nuni Nanev at Seattle Met

S-ano Nuni Nanev, formerly first tenor with the Royal Opera in Sofia, Bulgaria, and soloist with the Don Cossack Choir since 1949, will sing at the Metropolitan Theatre in Seattle, February 13. For further information, or to join in welcoming our distinguished *samideano*, call Seattle Esperanto Society, DE 3256.



S-ano Nuni Nanev

Foto el "Heroldo de Esperanto"

Post-cards Displayed

An exposition of postcards from around the world attracted considerable attention at El Cerrito, California, where they were on display at the Public Library. The cards, more than 200 in number, were among those received by Mrs. Harold Dreyer after her brief ad in *Heroldo de Esperanto* in which she asked for Esperanto-speaking "penpals".

The exposition was reported in the *Berkeley Daily Gazette* for Oct. 30. Mrs. Dreyer is the wife of S-ano H. R. Dreyer, who is well known for his activities in behalf of Esperanto among philatelic groups.

EAST COAST BRIEFS

At the regular January meeting of the Esperanto Society of greater New York, in studio 843, Carnegie Hall, on Saturday, the 9th, Mr. Machado, the Brazilian Consul in New York, lectured on present-day Brazil, highlighting his talk with references to the growing Esperanto movement in that country. . . . On Jan. 12, at All Souls Universalist Church, Brooklyn, John L. Lewine lectured about Esperanto and its founder, Dr. L. L. Zamenhof, before the Universalist Women's Club. An exposition of Esperanto literature and picture post cards had been arranged by Esperantist church members. Arrangements are being made to repeat this in other churches and Synagogues. . . . John Bovit provided flowers "in Loving Memory of Ludoviko L. Zamenhof" at the Dec. 27 meeting of the New York Society for ethical culture.

M. D. Reports on Professional Use of Internat'l Language

Dr. Richard Loewenberg of Bakersfield, Cal., a contributor to the Japanese-published *Medicina Revuo*, reports that the magazine "does remarkable pioneer work in the Far East in the field of medical science." Dr. Loewenberg is active in Esperanto work in Bakersfield, where he lectures to civic groups, Masons, Church groups, etc.

Exposition Viewed by Many in San Francisco Area

San Francisco Esperantists sponsored a large-scale exposition at the Main Public Library. Seven windows were filled with Esperanto correspondence, stamps, books, posters, etc. The green Esperanto flag and a portrait of Dr. Zamenhof were prominently displayed.

Esperanto Bible Presented to President Eisenhower

The American Bible Society recently presented President Dwight Eisenhower with a collection of Bibles in various languages for the use of foreign dignitaries who may be White House visitors from time to time. We are informed that an Esperanto Bible was among those presented.

ESPERANTO ★ TUTMONDE

laŭ aranĝo kun HEROLDO DE ESPERANTO



Por la unua fojo: Esperanto publike parolata en la Palaco de Nacioj, la eŭropa sidejo de la Unuiĝintaj Nacioj en Genevo.

La veno en Genevo de Sinjoro Ralph Harry, Ĝeneralkonsulo de Aŭstralio kaj Konstanta Delegito ĉe la Eŭropa Sidejo de la Unuiĝintaj Nacioj, donis novan impulson al nia afero en tiu ĉi urbo. Dank' al lia iniciato okazis informa prezento, klarigata en Esperanto de kolor-sonfilmo „Aŭstralio Hodiaŭ”, la 18-an de decembro 1953 en la Palaco de Nacioj.

Invititaj estis la personaro de la Sidejo kaj aro da konataj esperantistoj. La programo de tiu ĉi prezentado estis la jena: Enkondukaj vortoj de la Direktoro de l' UNO-Sidejo, s-ro A. Pelt; prelego de la Ĝeneralkonsulo de Aŭstralio pri la celo de la filmo; paroladoj de D-ro Edmond Privat pri la uzo de Esperanto en internaciaj konferencoj kaj de s-ro Hans Jakob pri la filmo kaj pri la praktika uzado de Esperanto.

La invito je tiu ĉi manifestacio estis farita de la UNO-Sidejo mem, kaj la filmo estas prezentita en la kino-salono de la Sidejo. Ĉeestis ĉ. 100 personoj, kiuj interese sekvis la parolojn de la oratoroj, kiuj vice evo uigis la programon en franca, angla kaj en Esperanto. Tiu ĉi manifestacio estas bona inaŭguro por la diskutado pri nia afero en la Unesko-Konferenco 1954, en Montevideo.

Konvenas diri kelkajn vortojn pri la filmo. Ĝi havas la celon diskonigi Aŭstralion kaj kuragigi energi-provizitajn eŭropanojn enmigri kaj krei al si novan hejmon. Estas konate, kiom faris la Aŭstralia Federacio (The Commonwealth of Australia) por ebligi al ekzilitoj kaj rifuĝintoj eŭropaj enmigri tiun ĉi terparton, la kontinenton de l' Estonto.

La klarigon pri la filmo (en Esperanto) plenumis samideano usona, s-ro G. A. Connor, New York. Dum duonhoron sekvis bildoj prenitaj el la naturo, kreskaĵoj kaj mirigaj mirindaj, floroj eksterordinaraj kaj same eksterordinara la bestaro. Grenkampoj kaj siloj, sukerkan-plantejoj, ŝafaroj kaj ŝaftondado, fiŝkaptado, minejoj, ŝtaloj, por nur citi la plej konatajn aktivecojn de l' aŭstralianoj. Bi doj de la ĉefaj urboj, de la eduk-institucioj, universitatoj dokumentas pri la alta kultura nivelo de la kvina kontinento. Laste aperis la ĉefurbo Canbera, laŭplane kreita sidejo de la Federacio de la Aŭstraliaj Ŝtatoj. Resume: Belega dokumento pri la temo, bonega ideo ĝin akompani per klarigo en Esperanto.

Al s-ro Ralph Harry, iniciatinto, aktiva esperantisto, ni povas diri p'envoĉe: Gratulon kaj sinceran dankon!

HANS JAKOB.

Haarlem invitas!



Adreso: 39-a Universal Kongreso de Esperanto, Poŝtako 140, Haarlem, Nederlando.

Dato: 31 julio—7 aŭg. 1954.

Pagoj: Per Rotterdamsche Bank, Haarlem (poŝtĝirkonto 604997).

LKK akceptas nur pagilojn ŝanĝeblajn en banko k.s. Ĝi abso'ute ne akceptas librojn aŭ varojn. Oni sendu aliĝilon kaj p'gon samtempe al la sama instanco, ĉu al Haarlem, ĉu al peranto. Uzu nur oficialan aliĝilon, eventuale petu ĝin de via landa asocio.

Dua Bulteno kun mendiloj por loĝejoj kaj ekskursoj ĵus aperis.

Fakaj asocioj: LKK d'spon'igas senpage salonojn al „kunlaborantaj fakaj asocioj” (de UEA). Aliaj asocioj devos pagi. Asocioj dezirantaj salonojn por fakaj kunsidoj kiel eble plej baldaŭ komun'ku tion al LKK kun indiko pri atendata nombro de ĉeestontoj.

La oficiala programo estas en preparado. Post aprobo de UEA ŝanĝoj kaj aldonaj estos fareblaj nur post novaj konsultoj kun la Estraro.

Kotizoj: Multa konfuzo ekzistas pri la kotizoj de edzinoj. Jen ekzemplaj (por la dua periodo): Edzo (kaj ĉiu plenkreska homo) gld. 22.—; edzino g'd. 11.—; edzo (membro de UEA) gld. 19.50; edzino de membro g'd. 9.75.


Statistiko (ĝis fino de 1953): Nederlando 361, Britujo 133, Germanujo 92, Svedujo 76, Jugoslavio 50, Italujo 42, Norvegujo 37, Belgujo 30, Danujo kaj Francujo po 20, Finnlando 17, Novzelando 9, Aŭstrio 6, Usono 5, Brazilo. Hi panujo kaj Portugalujo po 3, Kanado kaj Turkujo po 2, Indonezo, Japanujo kaj Kostariko po 1. Sume 930 el 23 landoj (pasintjare 458).

La 17.11. forpasis s-anino M. C. Merrick, edzino de konata blinda s-ano Merrick en Shepperton, Anglujo.

Biblioteko de Esperanto.

Peto al eldonantoj.

La Regna Biblioteko en Stokholmo (svede: Kungliga Biblioteket) volas fondi fakon por la internacia Esperanta literaturo. Ĝis nun el ĉio presita en Svedujo el ĉiuj presejoj de la lando speciala ekzemplero estas laŭleĝe liverata al la Regna Biblioteko kaj tie konservata. Do, la Biblioteko posedas jam Esperanto-fakon el ĉiuj presaj aperintaj en Svedujo en la daŭro de la jaroj. Ĉu la samideanoj de la tutmondo volas helpi al ni svedaj esperantistoj pri tiu grava afero? La regna bibliotekisto D-ro U. Willers kaj la bibliotekisto D-ro O. von Feilitzen, kun kiuj mi interkonsiligis, konsentis envicigi kun la sveda Esperanta fakoj ankaŭ internacian sektion, se intereso por tio montriĝas en la esperantistaj instancoj. La sveda parlamento ne asignis monon por tiu ĉi afero. Pro tio la tuto dependas de la donacemo de la eldonantoj de presaj Esperantaĵoj en la tuta mondo. Ĉu ili do bonvolos donace sendi, kiam ajn specimene, siajn librojn, broŝurojn, revuojn al la adreso: Kgl. Biblioteket, Humlegården, Stockholm, Svedujo?



Dulingvismo Angla-Esperanta.

Jen oni vidas samideanon F. Parker, energian propagandiston kaj sekretarion de la Esperanto-Federacio de Lancashire kaj Cheshire (Anglujo), dejoranta ĉe Esperanto-stando aranĝita de la Esp-grupo de Blackburn dum kvar tagoj, en la kadro de Ekspozicio de Flankokupoj, organizita de la Rotario-Societo. La ekspozicion vizitis 9600 personoj. S-ro Parker kaj liaj federaciaĵoj neniel kredas je sukceso de dulingvismo Angla-Franca; ekde ili estas konvinkitaj, ke dulingvismo kun Esperanto kiel dua lingvo povos esti multe pli efika.



Dulingvismo Franca-Esperanta.

Sur la supra bildeto ni vidas s-anon Omé en Rennes (Francujo) apud granda Esperanto-afiŝo gluita sur ŝtonfosto ĉe fervojo. Omé estas konvinkita, ke dulingvismo kun Esperanto kiel dua lingvo povos esti multe pli efika.

Angla-franca dulingvismo. Publika fiasko.

La Esperantista Grupo de Parizo proponis al s-ro Bressand, ĝen. sekretario de la Asocio por Angla-Franca Dulingvismo, dis-kuti publike la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de lia dulingvismo kaj tiujn de nia (Esperanta) dulingvismo. Aflabe s-ro Bressand akceptis, kaj la publiko estis kunvokata por ĉeesti la diskuton en la Amfiteatro de la Sorbono.

Je la indikitaj tago kaj horo la Amfiteatro estis plenplena, sed oni tuj eksciis, ke la prezidanto de la Asocio por Angla-Franca Dulingvismo malpermesis al s-ro Bressand partopreni, kaj s-ro Bressand do evitis la diskuton. Tamen li sendis junan sekretarion, kiu legis kelkajn foliojn, respondis iom al la demandoj, kaj la afero estis, tiel, finita.

La diskuto fariĝis grava publika fiasko de la angla-franca dulingvismo.

La fino de la kunveno estis okupita per interese diskuto, en Esperanto, inter ses samideanoj: franca, germana, brazila, angla, itala kaj jugoslava; ĝin partoprenis la publiko. Finfine, kompreneble, ĉia dulingvismo, alia ol esperanta-nacilingva, estis forĵetita.

Grava venko de Esperanto!

G.D.

Heroeca provo.

Laŭ „Stockholms-Tidningen” de 5.12.53, prezidanto Eisenhower, dum la politika konferenco en Bermuda, i.a. faris heroecan provon por konversacii kun la franca ministrara prezidanto Laniel en la franca lingvo, dum ili kaj Sir Winston Churchill estis fotografataj. Sed baldaŭ Eisenhower rezignacie diris kun ĝemeto: „Mia franca estas pli malbona ol lia angla.” Laniel ridetis, sed samtempe li montris ĉagrenan mienon.

Esperanto-kurso ĉe Torina fabriko.

En Torino (Italujo) malfermiĝis kurso por geoficistoj de konata fabriko „Riv”; gvidas s-ano Eduardo Zumbo.

Unua Esperanto-placo en Svedujo.

La urba konsilantaro de Göteborg, grava havenurbo ĉe Kategato, laŭ propono de la lokaj Esperanto-kluboj decidis doni al nova placo la nomon „Esperanto-Placo”.

En la sveda urbeto Bollnäs akceptis konata viand-entrepreno la Esperantan nomon „Viando”.

Zamenhof-soleno kun la

plej juna germana aŭtorino.

En la tuta mondo, ĉie kie ekzistas Esperanto-kluboj aŭ rondoj, la gesamideanoj festas la datrevenon de l' naskiĝo de la majstro per paroladoj, prelegoj, deklamado, muziko kaj kantoj, multloke ankaŭ per ekspozicio de Esperanta literaturo kaj vendado de libroj pro la samtaga Librotago.

Speciale solena estis la Zamenhoffesto en la germana urbo Stuttgart. La konata tiea skulptistino Frida Christaller, filino de nia fama mortinta samideano Prof. Paul G. Christaller, ankaŭ ŝi esperantistino, estis kreinta tre bonan buston de D-ro Zamenhof, kiun ŝi donacis al la loka Esperantogrupo. La oficiala inaŭguro de tiu busto okazis dum la Zamenhof-soleno, la 5-an de decembro 1953, kaj estis partoprenata de kelkaj eminentuloj. La unuan parton de la soleno ĉeestis ankaŭ eks-kultministro D-ro G. Schenkel kaj la polica komandoro por Stuttgart, Frank, ambaŭ esperantistoj kvankam ne plu aktivaj.

La ankaŭ ĉeestanta juna samideanino Sieglind Erika Schmalzriedt, pli bone konata sub sia Esperanta nomo Sinjo, kiu ricevis la titolon „la plej juna aŭtorino de Germanujo”, deklamis la „Preĝon sub la Verda Standardo” kaj poste rakontis kaj voĉlegis el sia libro „Sinjos Sprung über die Grenzpfähle”. Tiu libro, en kiu ŝi germanlingve rakontas siajn travivaĵojn en diversaj landoj per Esperanto, akiris grandan atenton, kaj la unua eldono de 5000 ekzempleroj tiel rapide disvendigis, ke la eldono jam konsideras la presigon de dua kvinmilo. La libro estas, nerakte, bonega varbilo por nia lingvo kaj nia ideo precipe inter la junularo.



Sur la foto oni vidas la skulptistino s-anon Frida Christaller, Sinjon kaj la festparolinton Prof. Huttarsch el Waiblingen, fone la buston de la majstro antaŭ la Esperanta flago.

Fotografis Helmut Krause-Willenberg, Möhringer Strasse 22, Stuttgart-Degerloch; ankaŭ li estas samideano.

Pri Zamenhof-festo en alia germana loko, urbeto Taifingen ne malproksime de Stuttgart, ni vidis bonan raporton en du gazetoj kaj 16-punktan programon. Ĉeestis la urbestro s-ro Schöller, kiu substrekis en parolado la sencon kaj celon de Esperanto; du malnovaj pioniroj, s-anoj Saemann kaj v. d. Ley, estis honorataj.

HEROLDO DE ESPERANTO

Eldono: *Heroldo de Esperanto*, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederl. Aperas principe dufoje monate, sed dum la somera sezono unufoje monate.
Redaktoro: T. Jung. — Jarabono 4.— dolaro

Oni pagu la kotizon al D. E. Parrish, 328 West 46th Street, Los Angeles 37

NORD-AMERIKA MODERNA MUZIKO

De Elwyn C. Pollock



(Ĉi-sube komenciĝas serio de ses artikoloj pri niatempa muziko en Norda Ameriko. Verkita laŭ la klasika strukturo de simfonio, ĝi konsistas el Uverturo kaj kvin Movimentoj. Traktotaj estas kaj serioza kaj tiel-nomata "populara" aŭ "mod-muziko".)

Uverturo

PROFETO SEN HONORO

La historio de moderna muziko en Usono realportas nin al sufiĉe frua epoko, tio estas, frua laŭ tiu speciala kampo de arto, kaj rilatas al homo kiu, je tiu tempo, ne estis multe atentata, sed kiun oni nuntempe konsideras la plej granda komponisto vivanta!

Dediĉante siajn "Traktatojn Antaŭ Sonato", Charles Ives (elp.: Ajvz) atentigas, "Tiuj ĉi enkondukaj traktatoj estas verkitaj de la komponisto por tiuj, kiuj ne povas toleri lian muzikon, kaj la muziko por tiuj, kiuj ne povas toleri la traktatojn; al tiuj, kiuj ne povas toleri unu aŭ la alian, la tuto estas respekte dediĉita!"

Tiu ĉi Sonato, per kiu Ives instige stimulis la muzikan mondon, estas subtitole nomita "Concord, Mass. 1840 — 60". La kvar partoj, aŭ movimentoj, montras la nomojn de Usonaj verkistoj el la Concord-grupo: Emerson, Hawthorne, "The Alcotts", kaj Thoreau. La muziko estas ege malfacila, kiel ankaŭ teknike nekonvenca. Troviĝas tia vario en la stilo, de kvazaŭ himno-arioj ĝis komplikitaj kombinaĵoj de sono, ke oni ne povas ilin klasifiki per iu ajn sistemo de la moderna harmonio! La movimenton rilate al "The Alcotts" inspiris la Kvina Simfonio de Beethoven. Rimarkigis la komponisto pri la Emerson-movimento: "Metronomo ne

povas mezuri la menson kaj la ĉioenhavan animon de Emerson, ne pli ol povus same fari la malnova Concord-pintura sonorilo!"

En tiuj ĉi observaĵoj kuŝas la esenco de ĉiu muzikaĵo, kiun Ives komponis. Por li la muziko estas transcenda esprimo de la universala animo, ne mezurebla per materialismaj rilatoj de muziknotoj kaj tempo. Sed pro tio, ke Ives estas amerikano, li rigardas la universon de Ameriko. La temo de liaj komponaĵoj estas amerika: ilia fonto de inspiro apartenas al la tuta homaro.

En sia orkestra grupo "Three Places in New England", Ives prezentas vastan panoramon de tiu ĉi universala amerikanismo. La unua movimento portas la nomon "Boston Common", kiu speciale rilatas al "St. Gaudens Monumento" pri Kolonelo Shaw kaj lia negra regimento. La dua bildigas "Putnam's Camp in Redding, Conn.", kun ĝiaj revoluciaj memoroj. La tria estas la "Housatonic River at Stockbridge" en kiu ankoraŭ unu fojon temas ĉefe la Beethoven-a Sorto-movimento.

Ives lernis la rudimentojn de muziko de sia patro kaj pli poste ricevis akademian preparadon ĉe la Universitato Yale sub gvido de Horatio Parker. Li komponis simfonion tute konvencian en idiomo sed montrantan kompletan superecon de tekniko. Tiuj, kiuj kritikis la harmonian tumulton de la pli postaj partituroj, pensante, ke ili montras nescion de muzikleĝoj, povas re-trankviliĝi per la ekzameno de tiu frua simfonio.

Post la finiĝo de sia formala edukado, Ives ne tuj fariĝis profesia komponisto; sed li modere prosperis kaj pro tio eblis al li demeti sufiĉe da mono por eldoni kelkajn el siaj komponaĵoj. Nenia prezo aŭ kopirajto ekzistas en la unua volumo: *114 Kantoj de Charles E. Ives*. La plej frua el tiuj ĉi kantoj datumiĝas 1889, kiam li havis 15 jarojn! Noteto en la kolekto klarigas: "Tiu ĉi libro estas private eldonita kaj ne estas permesible ĝin vendi. Komplimentaj ekzempleroj estos senditaj al iu ajn tiel longe, kiel daŭras la provizo. Pri la muziko, iu ajn, se li tiel inklina, povas ĝin uzi, kopii, transklavigi, aŭ adapti por aliaj instrumentoj."

Komponisto Charles Ives ĉe lia hejmo en West Redding, Conn.



Estis nur post 1940, kiam lia muziko fariĝis komprenebla al muzikistoj, kaj Ives estis nomata geniulo de la plej imponaj kritikuloj, ke grandaj eldonistoj ekkomprenis la komercajn eblecojn kaj tuj komencis la eldonadon de la Ives-komponaĵoj je negoca bazo.

Post nelonge oni komencis prezenti la muzikon de Ives en koncert-haloj. John Kirkpatrick, sindona, juna pianisto, konsumis du jarojn ellernante la eposon "Concord-Sonato" kaj ĝin ludis, parkere, en Novjorko la 20-an de januaro, 1939. Lawrence Gilman skribis en la Novjorka *Herald Tribune*: "Ĉi tiu Sonato estas escepte granda muziko—ĝi ja estas la plej granda muziko komponita de amerikano, kaj la plej profunde kaj esence amerika. impulse kaj signife."

En 1947 Ives ricevis la Pulitzer-premion por la tria simfonio komponita 36 jarojn pli frue.

La muziko de Ives prezentas strangan miksaĵon de precizo kaj libereco de interpretado. Unu el la ĉefaj aferoj, kiujn li celis, estis reprezenti la muzikon de vilaĝbandoj kaj danc-violinistoj, en kiuj improvizado kaj spirito de amuzo en muzik-farado estas superaj konsideroj. Je unika okazo kiam li ĉeestis koncerton por aŭskulti sian muzikon, la bando faris iom fuŝan prezenton. Sed li laŭdis la direktiston per tiuj ĉi vortoj: "Estis ĝuste kiel urbo-kunveno—ĉiu por si mem. Mirinde, kiel ĝi eliĝis!"

En la skizoj por la "Tri-paĝa Sonato" li enmetas memorigon: "Returnu al la unua subjekto—ĉiuj ĝentilaj sonatoj devas havi unuan subjekton." Iom plue oni trovas ĉi tiun enskribon: "Marŝo-tempo sed ne marŝo, Rollo!" En unu el siaj kantoj Ives montras "blu-noton" kaj aldonas parenteze: "Uzu sabaton nokte!"

En la kord-kvarteto en tri movimentoj markitaj "Diskuto", "Argumentoj" kaj "Voko de l' Montoj", Ives aldonas ĉi tiun komenton: "Kord-kvarteto por kvar homoj, kiuj konversacias, diskutas, argumentas (politikon), batalas, manpremas, fermiĝas, tiam supren marŝas la montflankon por vidi la firmamenton!" Unu parto estas markita "Andante Emasculato"; alia peco, "Con Scratchy" (grate). Li avertas la ludanton: tro malfacile por ludi—do ĝi simple ne povas esti bona muziko, Rollo!" Kaj tiam denove: "Eniĝu, Profes-

LEŜHAJ, LA ĈEFO KONATA

De Arthur C. Ballard

Leŝhaj, elstarulo inter la Niskvalianoj, tribo loĝanta ne malproksime de la Marbrako Puget en nordokcidenta Usono, protestis traktaton trompeme negociitan. Sekvis militado. Ambaŭflanke abomenaĵoj fariĝis, sed ne fare de Leŝhaj, kiu forte malaprobis tiaĵojn. Ĝis nun la vera rakonto de tiu epizodo ne estas ĝenerale konata. Malgraŭ lia sinteno humana kaj la justeco de liaj celoj, ĉar li gvidis la bataladon kontraŭ la aŭtoritatoj blankhaŭtaj, kaj por timigi liajn grupanojn, oni lin pendigis. Vere li estis martiro por sia popolo.

Leŝhaj, la ĉefo konata, akre sentinte ĉasadon,
Hejman bienon forlasis, flugis al fora tendaro.
Amasaĉuloj lin serĉis. Kial serĉado fariĝis?
Nure li ade protestis kontraŭ traktato maljusta.
"Tiun trompaĵon ne fidu. Tero ne restos sufiĉa
Por la gentanoj la niaj. Nian hejmaron ni perdos,
Foren ja oni nin pelos. Eĉ se batali ni devos,
Mortu ni ĉiuj prefere ol landon la nian ni perdu."

Tiel parolis la ĉefo, de popolanoj gvidanto,
Leŝhaj, bravulo konata, eĉ tiam persekutota.
Regis milito terura, abomenaĵoj fariĝis,
Sekvis finfine malvenko, oni gvidanton perfidis.
Vengon venkintoj preparis, ili pendigi lin celis,
Ja oni lin martirigis. Kiel heroo li mortis.

Pro lia morto martira post la batala elveno,
Inter la simpatiintoj forta indigno vekigis.
Tuŝis eĉ mensojn arogajn inter venkintaj gvidantoj
Sento ioma pri deco, ankaŭ de honto ŝuldiga.
Poste ricevis gentanoj iom da tero pli multe.
Lin posteuloj honoras, ĉiam fiere memoros—
Leŝhaj, la famekonata, de la popolo martiro,
Leŝhaj, de siaj gentanoj, ĉiam la protagonisto.

oro, ĉiuj en la kleo de C-natura. Vi povas tion fari ĝentile kaj bele." Kaj fine, Ives sin komplimentas: "Beleta kanto, Sinjorinoj."

Charles Ives, la kreinto de la plej kompleksa muziko, restas, je aĝo de preskaŭ 79 jaroj, nereformita idealisto. Lia fido en la progreso de la Homo kaj en la progreso de arto restas firma. Desegnita je plano de giganta dimensio, lia nefinita Universa Simfonio, en kiu kelkaj orkestroj kune muzikas en transcenda harmonio de disharmonioj, estas

deklaro de ĉi tiu fido, ke oni devas spiti preter la tuja plenumbla, por ke oni faru praktika kion foje oni rigardas kiel neeban.

(Ni dankas al la gazeto *Américas* por permeso ĉerpi materialon el la septembro-numera artikolo "A Musical Rebel", de Nicolas Slonimsky.)



La Revuo troviĝu en ĉiu biblioteko kaj lernejo. Donacabono, 30 cendoj.

LA KORO DENUNCA

La fama novelo de Edgar Allan Poe

Vere!—nerva—tre, treege nerva mi estis kaj estas; sed kial vi insistas diri, ke mi estas freneza? La malsano akriĝis—ne mildiĝis—la sensojn. Super ĉio akriĝis la aŭd-senso. Ĉion en la ĉielo kaj en la tero mi aŭdis. Multon mi aŭdis en la infero. Kial, do, mi estas freneza? Aŭskultu! kaj vidu kiel sane—kiel trankvile mi rakontos al vi la tuton.

Estas neeble diri kiel la ideo ekvenis en mian cerbon; sed estante jam konceptita, ĝi obsedis min tage kaj nokte. Celo estis nenia. Pasio estis nenia. Mi amis la maljunulon. Li neniam faris al mi malbonon. Li neniam faris al mi insulton. Lian oron mi ne deziris. Mi pensas, ke estis lia okulo! jes, tiel estis! Li havis la okulon de vulturo—pal-bluan okulon, kaj super ĝi film-aĵon. Kiam ajn ĝi falis sur min, mia sango kuris malvarma; do grade—tre grade—mi decidiĝis preni la vivon de la maljunulo, kaj tiel liberigi min por ĉiam de la okulo.

Jen do la punkto. Vi imagas min freneza. Frenezuloj scias nenion. Sed vi devus esti vidinta *min*. Vi devus vidi kiel prudente mi procedis—kun kia singardo—per kia antaŭvido—sub kiaj ŝajnigoj mi metis min al la tasko! Neniam mi estis pli kompleza al la maljunulo ol dum la semajno antaŭ kiam mi mortigis lin. Kaj ĉiun nokton, ĉirkaŭ la noktomezo, mi turnis la klinton sur lia pordo kaj malfermis ĝin—kiel malabrupte! Kaj tiam, kiam mi faris apertajon sufcitan por mia kapo, mi enmetis malluman lanternon, tute fermitan, fermitan, por ke neniu lumo ekbrilu, kaj tiam mi enigis la kapon. Ho, vi ridus, vidante kiel ruze mi enigis ĝin! Mi movis ĝin malrapide—tre, tre malrapide, ke mi ne ĝenu la dormon de l' maljunulo. Necesis unu horo por enmeti la tutan kapon en la apertajon tiel, ke mi povis vidi lin kuŝanta sur la lito. Ha! —ĉu frenezulo estus tiele prudenta? Kaj tiam, kiam la lanterno estis tute en la ĉambro, mi malfermis la lanternon tre zorge—ho, kiel zorge—zorge (ĉar knaris la ĉarniroj) —mi malfermis ĝin nur tiom, ke unu sola maldika radio falis sur la vulturokulon. Kaj tion mi faris sep longajn noktojn—ĉiun nokton je noktomezo—sed mi trovis la okulon ĉiam fermita; kaj tial estis neeble por mi plenumi mian taskon;

ĉar ne estis la maljunulo, kiu ĉagrenis min, sed lia Malica Okulo. Kaj ĉiun matenon, kiam estiĝis la tago, mi iris kuraĝe al li, dirante lian nomon bonkore, kaj lin demandante pri kiel li tradormis la nokton. Vi do vidas, ke li ja estus tre sagaca viro, se li suspektus, ke ĉiun nokton, precize je la dek-dua, mi surrigardas lin dum li dormas.

La okan nokton mi malfermis la pordon pli singarde ol kutime. La minuta fingro de horloĝo moviĝas pli rapide, ol moviĝis mia mano. Neniam antaŭ tiu punkto mi *sentis* la vastecon de miaj povoj—de mia sagaco. Mi apenaŭ povis bridi mian senton pri triumfo. Nur pensi, ke jen mi malfermas la pordon, iom-post-iome, kaj li eĉ ne supozetas miajn sekretajn farojn aŭ pensojn. Mi bruetis per gorĝa rido; kaj povas esti, ke li min aŭdis; ĉar li ekmovis subite sur la lito, kvazaŭ surprizite. Nu vi eble pensas, ke mi retiris min—sed ne. Lia ĉambro estis peĉe nigra pro la mallumo, (ĉar la fenestro-ŝirmiloj estis ŝlositaj, pro timo al rabistoj,) kaj tial mi sciis, ke li ne povas vidi la malfermiĝadon de la pordo, kaj mi daŭris puŝeti ĝin, ade, ade.

Mi estis enmetinta la kapon, kaj malfermonta la lanternon, kiam mia dikfingro fuŝglitis sur la stana fiksilo, kaj la maljunulo eksaltis en la lito, kriante: “Kiu estas tie?”

Mi restis tute silenta kaj diris nenion. Dum tuta horo mi ne movis muskolon. kaj dumtempe mi ne aŭdis lin rekuŝiĝi. Li ankoraŭ sidis sur la lito, aŭskultante; —same kiel mi mem, nokton post nokto, kiam mi aŭskultas la morto-gardistojn sur la muro.

Post iome mi aŭdis mallaitan ĝemon, kaj mi sciis, ke estas ĝemo de mortotimo. Ne estis ĝemo de doloro aŭ de malĝojo—ho, ne!—estis la malalta, sufoka sono, kiu leviĝas el la fundo de animo troŝargita de timo. Mi konis bone tiun sonon. Multajn noktojn, ĝuste je noktomezo, kiam la tuta mondo dormis, ĝi leviĝis el mia sino, pli-profundigante per sia terura eĥo la timegojn, kiuj distras min. Mi deklaras, ke mi ĝin bone rekonis. Mi sciis, kion sentas la maljunulo, kaj kompatis lin, kvankam en la koro mi ridaĉis. Mi sciis, ke ekde la unua mallaita brueto, kiam li turnis sin en la lito, li maldormas. De tiam liaj ti-

moj daŭris kreski en li. Li provadis imagi ilin senkaŭzaj, sed ne povis. Li diradis al si—“estas nenio, nur la vento en la kam-entubo—estas nura muso, transiranta la plankon”, aŭ “estas simple grilo, kiu unufoje ĉirpis”. Jes, li provis trankviligi sin per tiuj ĉi supozoj; sed li trovis ĉion vana. *Tute vana*; ĉar la Morto, lin alproksimiĝante, ŝteliradis kun sia nigra ombro antaŭe, kaj ĉirkaŭis sian viktimon. Kaj estis la malĝojiga influo de la neperceptita ombro, kiu igis lin senti—kvankam li nek vidis nek aŭdis—igis lin *sent*i la ĉeston de mia kapo en la ĉambro.

Kiam mi estis atendinta longan tempon, tre pacience, sen aŭdi lin kuŝiĝi, mi decidis malfermi etan—tre, tre etan apertajon sur la lanterno. Do mi malfermis ĝin—vi ne povas imagi kiel kaŝe, kaŝe—ĝis, post tempo, unu sola pala radio, kiel la fadeno de araneo, eljetis sin tra la apertajo kaj falis ĝuste sur la vulturokulon.

Ĝi estis malferma—vaste, vaste malferma—kaj mi furioziĝis, ĝin rigardante. Mi vidis ĝin kun perfekta klareco—la tuton malhele blua, kun malbelega vualaĵo super ĝi; kiu malvarmigis eĉ la medolon en miaj ostoj; sed mi povis vidi nenion cetere de la vizaĝo aŭ persono de la maljunulo: ĉar mi estis direktinta la radion kvazaŭ per instinkto, precize sur la damnindan lokon.

Kaj ĉu mi ne diris al vi ke tio, kion vi erare opinias frenezeco estas nur superakreco de la sensoj?—nun, mi diras, venis al miaj oreloj mallaita, malakra, rapida sono—tia, kian faras horloĝeto ĉirkaŭita per kotono. Mi rekonis tre bone ankaŭ *tiun* sonon. Estis la koro de la maljunulo, batadante. Ĝi pliiĝis mian koleron, kiel la batado de tamburo plikuraĝigas soldaton.

Tamen mi ankoraŭ retenis min kaj silentis. Mi apenaŭ spiris. Mi tenis la lanternon senmova. Mi eksperimentis pri kiel firme mi povas tenadi la radion sur la okulo. Dume la infera tamburado de la koro pliiĝis. Ĝi fariĝis pli kaj pli rapida kaj pli kaj pli laŭta je ĉiu momento. La teruro de la maljunulo devis esti ega! Ĝi fariĝis pli laŭta, mi diris, pli laŭta je ĉiu momento!—ĉu vi atentas, kion mi diras? Mi jam sciigis, ke mi estas nerva; tia mi estas. Kaj nun je la mortohoro de la nokto, meze de la timiga silento de tiu maljuna domo, tiel stranga bruoj agitis min al nebridebla teruro. Tamen dum kelkaj minutoj ankoraŭ mi retenis min kaj staris senmova. Sed la batado fariĝis pli laŭta,

pli laŭta! Mi pensis, ke la koro devos kreviĝi. Kaj nun ekkaptis min nova maltrankvilo—la sonon aŭdos najbaro! Venis la Horo de la maljunulo! Kun laŭta ek-krio, mi malfermis la lanternon kaj saltis en la ĉambron. Li elkriis unufoje—nur unufoje. Tuj mi trenis lin sur la plankon, kaj tiris la pezan liton sur lin. Tiam mi ridetis gaje, trovante, ke la faro tiel progresis. Sed, dum multaj minutoj, la koro daŭris bati kun obtuza sono. Ĉi tio, tamen, ne ĉagrenis min; ĝi ne estus aŭdebla preter la muro. Post iome ĝi ĉesis. La maljunulo estis morta. Mi forigis la liton kaj ekzamenis la kadavron. Jes, li estis tute, komplete mortinta. Mi metis mian manon super lian koron kaj tenis ĝin tie multajn minutojn. Neniu pulsado estis. Li estis tute morta. La okulo ne ĝenus min plu.

Se vi ankoraŭ opinias min freneza, vi ne plu tiel pensos kiam mi estos priskribinta la prudentajn zorgojn kiujn mi elpensis por kaŝi la korpon. La nokto maljunigis, kaj mi laboris rapide, sed silente. Unue mi dismembrigis la kadavron. Mi detranĉis la kapon kaj la brakojn kaj la kruojn.

Tiam mi forprenis tri tabulojn de la ĉambra planko, kaj lokigis ĉion inter la trabaron. Mi tiam remetis la tabulojn tiel lerte, tiel ruze, ke neniu homa okulo—eĉ ne *lia*—povus eltrovi ion misan. Ne estis io lavenda—nenia makulo—neniu ajn sango-spuro. Mi estis tro zorga por ne eviti tion. Kuvo kaptis ĉion—ha! ha!

Kiam mi finis ĉi tiujn laborojn, estis la kvara horo—ankoraŭ malluma kiel noktomezo. Dum la sonorilo sonis la horon, venis frapado ĉe la strata pordo. Mi iris malfermi ĝin kun facila koro,—ĉar kion mi havis nun por timi? Envenis tri viroj,

kiuj konatigis sin, kun perfekta komplezo, kiel oficistojn de la polico. Kriego estis aŭdita de najbaro dum la nokto; ekestis suspekto pri krimago; sciigo estis farita al la policejo, kaj ili (la oficistoj) estis deputitaj serĉi la domon kaj la apartenantan terpecon.

Mi ridetis—ĉar *kion* mi timu? Mi bonvenis la sinjorojn. La kriego, mi diris, estis la mia en sonĝo. La maljunulo, mi menciis, forestas en la kamparo. Mi gvidis miajn vizitantojn tra la tuta domo. Mi invitis ilin serĉi—*bone* serĉi. Mi kondukis ilin, fine, al *li* ĉambro. Mi montris al ili liajn trezorojn, sekuraj, neĝenitaj. En la entuziasmo de mia memfido, mi portis seĝojn en la ĉambron, kaj petis, ke ili *ĉi tie* ripozu por refreŝigi sin, dum mi mem, en la senzorga aplombo de mia perfekta triumfo, metis mian seĝon ĝuste super la loko, kie ripozis la kadavro de la viktimo.


La oficistoj estis konvinkitaj. Mia *konduco* konvinkis ilin. Mi estis aparte trankvila. Ili sidis, kaj dum mi respondis gaje ili babilis pri ĉiutagaĵoj. Sed, antaŭ nelonge, mi sentis min paligi kaj deziris ilin forrintaj. Mia kapo doloris, kaj mi imagis sonoradon en la oreloj: sed ili ankoraŭ sidis kaj babiladis. La sonorado fariĝis pli aŭdebla:—ĝi daŭris kaj fariĝis pli aŭdebla: mi parolis pli libere por forigi la senton: sed ĝi daŭris kaj pliigis je neteco—ĝis, post iome, mi trovis, ke la sono *ne* estas interne de miaj oreloj.

Sendube mi nun fariĝis *tre* pala;—sed mi parolis pli flue, kaj kun pli alta voĉo. Tamen la sono pliigis—kaj kion mi povis fari? Ĝi estis *malalta, obtuza, rapida sono*—*tre simila al tia sono, kian faras horloĝo, ĉirkaŭita per kotono*. Mi ekspiris spasmes—sed tamen la oficistoj ĝin ne aŭdis. Mi

parolis pli rapide—pli energie; sed la bruo daŭre plilaŭtigis. Mi ekstaris kaj disputis pri bagateloj, altagame kaj kun fortegaj mansvingoj; sed la bruo daŭre plilaŭtigis. *Kial do* ili ne foriras? Mi paŝis tien-reen sur la planko, kvazaŭ agitata ĝis furiozeo pro la rimarkoj de la viroj—sed la bruo daŭre plilaŭtigis. Ho Dio! kion mi povis? Mi ŝaŭmis—mi furiozis—mi blasfemis! Mi ŝvingis la seĝon sur kiu mi sidis, kaj gratis ĝin sur la tabulojn, sed la bruo levigis super ĉio kaj daŭre pliigis. Ĝi iĝis pli laŭta—pli laŭta—*pli laŭta!* Kaj ankoraŭ la viroj babiladis agrable, kaj ridetis. Ĉu eble, ke ili ne aŭdas? Ĉiopova Dio!—ne, ne! Ili aŭdis!—ili suspektis!—ili *scias!*—ili mokas mian teruron!—ĉi tion mi pensis, kaj ĉi tion mi pensas. Sed kio ajn estus prefera al ĉi tiu angoro! Kio ajn estus pli tolerebla ol ĉi tiu prirido! Mi povis elporti tiujn hipokritajn ridetojn ne plu! Mi sentis, ke mi devas aŭ elkrii aŭ morti! Kaj nun—denove!—aŭskultu! pli laŭte! pli laŭte! *pli laŭte!*

"Kanajloj!" mi kriegis, "ŝajnu ne plu! Mi konfesas la faron!—disŝiru la plankon! jen, ĉi tie!—batadas lia terura koro!"

—Tradukis D.B.R.




La plej interesa libro
aperinta ĝis nun en Esperanto
El ĉie kaj pri ĉiaj aferoj!

Prezo \$1.65, inkluzive sendkostojn

Mendu de:

Esperanto League Book Service
Middleton, Wisconsin



Portreto de homo, kiu ne bezonas Esperanton



**Esperanto
and Stamps**
by **Conrad Fisher**
RFD1, Meadville, Pa.

Topical collections are becoming more and more popular nowadays: music on stamps, religion on stamps, flowers on stamps, etc. The stamps and cancelations bearing text in Esperanto are included in "Esperanto on stamps". The first such stamp was the 7k one issued by the Soviet Union in 1925 to honor its radio pioneer. It is listed as #328 in Scott's catalog, and bears the text **INVENTISTO DE RADIO POPOV**. The most recent issue was of 3 Yugoslavian stamps bearing the text **38-a UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO 1953 ZAGREB**.



Between the two extremes are found 1925 #329, 1926 #347, -8 (**INTERNACIA PROLETARIA KONGRESO DE ESPERANTO**), 1927 #353, -6 (surcharged, #373, -4 (**ESPERANTO**, portrait of Zamenhof). 1930 #436, 437 are not listed with any reference to Esperanto, but the texts are in Esperanto: **CENTRA TELEGRAFO MOSKVO** and **VOLĤOV je la nomo de LENIN**.

In 1935, Brazil took over and issued #411 (**SPECIMENA FOIRO**), 1936 #427 same text, #442 (**BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO**), 1937 #445 (**JUBILEO DE ESPERANTO**), 1945 #626 bearing the text **BRAZILA KONGRESO DE ESPER-**

ANTO and #C 61 with the same text, but for airmail.

Bulgaria issued #B 17, a semipostal with text **30 JUBIL. KONGRESO**; in 1949 Austria issued #539, text "**ESPERANTO**" and has promised to issue another this year to commemorate the fiftieth anniversary of the movement in that country.

Postal stationery or entires, cards and envelopes, are another part of this topic. They have been issued by the U. S. S. R., Brazil, Austria, Czechoslovakia, Germany, Leichenstein, Hungary, Danzig, and Netherland, mainly of tourist interest.

Announcements of Esperantists who want to correspond for the purpose of exchanging stamps are published in the various Esperanto philatelic magazines, the chief ones being:

La Filatelisto, Jules Coste, redaktoro, 15 Rue Elzevir, Paris III, France; and

Internacia Poŝtmarka Revuo, Internacia Asocio de Poŝtmark-kolektantoj, Box 5085, Goteborg 5, Sweden.

As American representative for both of these publications, I will be happy to accept subscriptions. Sample copies of *La Filatelisto* are available—send a self-addressed envelope and use commemorative stamps.

Names of foreign collectors wanting to correspond are also on file with the North American Correspondence Service, 9079 Madison Ave., La Mesa, Cal.

Translation Contest

We regret to announce that no acceptable entries were received in our contest to translate the poem "A Psalm of Life". Nevertheless, since contests of this kind were quite popular some years ago, and produced a great many excellent translations, we feel that this feature deserves another try. This time we are allowing each contestant to make his own choice of poem to be translated.

Make sure the poem is not covered by copyright, or get permission from the copyright owner to use his poem. Anything first published and copyrighted over 56 years ago is safe to use. The translation must of course be your own, and must never before have been published. Mail your entry to: W. G. Adams, Kingston, Wash. no later than March 5, 1954. One prize consisting of Esperanto books will be awarded.

Some readers complained that "A Psalm of Life" is too difficult to translate satisfactorily, principally because of the great many monosyllables, which are not so plentiful in Esperanto as in English; however it is quite likely that a good translation can be made, and perhaps we can produce one for the next issue. At that time we will also feature an interesting article by S-ano Adams on Esperanto translations.

**ADDRESS
CHANGED?**



We want all our mem- Name
bers and subscribers to
get their *Reviews* NEW ADDRESS
promptly. When you
move, let us know im-
mediately so our rec-
ords will be up-to-date. OLD ADDRESS
Use this form or write (Zone No.)
the information on an
ordinary postal card.

Mail to: *Esperanto League, 123 East 35th St., Brooklyn 3, N. Y.*

HOW TO LEARN ESPERANTO

Number 2 in a series

READ THE "KRESTOMATIO"

When I was a beginner in Esperanto, and that wasn't yesterday, there was one book which every Esperantist was expected to read and study as a guide to good style. That book was the *Fundamenta Krestomatio de Esperanto*. It was compiled by Zamenhof, who says in the introduction: "Ĉiu artikoloj en la Fundamenta Krestomatio estas aŭ skribitaj de mi mem, aŭ—se ili estas skribitaj de aliaj personoj—ili estas korektitaj de mi en tia grado, ke la stilo en ili ne deflankiĝu de la stilo, kiun mi mem uzas".

The *Krestomatio* is a book of 463 pages, and the contents are divided into the following sections: "Ekzercoj", "Fabeloj kaj Legendoj", "Anekdotoj", "El la Vivo kaj Scienco", "Artikoloj pri Esperanto", and "Poemoj". This material is taken chiefly from the pages of the early magazines published in Esperanto. It was first published in 1903 and up to 1927 went through eleven editions.

I think that in the early days better Esperanto was written than is the case nowadays. Perhaps the early Esperantists were influenced by French, of which it has been said: "If it is not clear, it is not good French." It ought to be even more true of Esperanto: "If it is not clear, it is not good Esperanto."

I am afraid that some of the Esperanto literature of late years, measured by that rule, cannot be described as good Esperanto. Every Esperantist knows what it is to find in some book involved phrases and complicated compound words, which force him to pause and study out the meaning. The influence of the magazine *Literatura Mondo*, which for some years was the chief source of Esperanto literature, was perhaps not in the direction of a clear and simple style. The authors of the majority of the books published by *Literatura Mondo* were Hungarians, which may have influenced their style, and Hungarian is a language of an entirely

ESPERANTO ON YOUR TYPEWRITER

If your typewriter is not already adapted to write the Esperanto supersigns, it is a fairly simple matter to have this done. The alterations are minor ones, and can be done in any typewriter repair shop for a cost of three or four dollars. The key at the far right of the keyboard—the one with the "at" and "cents" signs—is usually the one replaced by a special key bearing the two supersigns. This key, on almost all models, can then be made a "dead" key so that when it is struck the carriage will not move. This way, if you want to write a ĉ for example, you strike the supersign key first; the carriage does not move; then you strike the c, which will print directly under the circumflex. In the case of models which do not allow for "dead" keys, it is necessary to backspace after striking the supersign, in order to fill the letter in beneath it.

The special type for Esperanto supersigns is made by Remington Rand and quite possibly by other typewriter manufacturers. Actually, the Remington Rand type will fit just as well on many other makes; however, even if the special type should not be available for your particular typewriter, it is still relatively simple to make up the type specially. Have your typewriter repairman cut off the bottom two-thirds of a capital A and the top two-thirds of a capital O, leaving the portions that correspond to the two necessary supersigns. He can then saw these two types into the proper size to fit into position on the type bar.

different family from the Indo-European languages on which Esperanto is based.

If you want interesting and diversified reading, and if you want to acquire a good style in writing and speaking Esperanto, then you are advised to secure and read and re-read the *Krestomatio*. It is not as much read as in the past, but it deserves a place in the library of every Esperantist.

W. G. Adams

To be positioned properly, the breve should be low enough to print just above a capital U; if it is adjusted for a small u, it will probably not be high enough to clear the capital letter. For the circumflex, use the capital letter J for positioning, adjusting the circumflex so it just touches the horizontal line at the top of the J. This should put it high enough to clear all the letters with which the circumflex is used, but not so high as to run above the ribbon.

If you wish, two special keys can be made up for you by your typewriter repairman, one with both a capital and a lower-case breve, the other with both capital and lower-case circumflex. This arrangement is slightly superior, in that it will allow the supersigns to fit snugly above the lower-case letters as well as the capitals. With both supersigns on a single key, there will be a little extra space between lower-case letters and their supersigns.

You may wish to take this article with you to show your repairman. For his benefit, then, these are the letters which sometimes bear diacritical marks in Esperanto: Ĉ ĉ Ĝ ĝ Ĥ ĥ Ĵ ĵ Ŝ ŝ Ŭ ŭ.



Correspondence Service

The North American Correspondence Service now has on file the names and addresses of Esperantists in almost every part of the free world who are looking for correspondents in the United States or Canada. Included are many collectors who wish to trade stamps, covers, post-cards and similar items.

Sano Elwyn C. Pollock, director of the Service, points out that corresponding with Esperantists in other countries is one of the most effective means for beginners to perfect their command of the language and urges all Esperantists, whether beginners or not, to take full advantage of the Service.

The services of the NACS are free and are available to everyone, not just members of the Esperanto League. The address is: North American Correspondence Service, 9079 Madison Ave., La Mesa, Cal.

(Continued from page 1)

did not even occur to them to check the correctness of their assumption.

If we blame *Life* for this error, we are making an even bigger mistake ourselves, for if *Life's* editors are misinformed about Esperanto it is our fault for not having properly informed them. The same can be said in regard to the State Department. The fault lies with the Esperanto movement for the incredibly poor job of publicity which has been done in North America since the end of World War II. It was, of course, the do-nothing attitude of the North American Esperanto movement in recent years which, along with other factors, brought about the formation of the active Esperanto League for North America some months ago.

Nevertheless, the League itself can not do the entire job alone. Without unlimited resources of money and manpower, we can succeed in our effort to acquaint the American public with the true facts about Esperanto only with the whole-hearted help of all our members.

Within our own circles we recognize a distinction between Esperanto, the language, and Esperanto, the movement. On the one hand we have an instrument of great utility, of which the possibilities for the general betterment of mankind are enormous almost beyond calculation. On the other hand, we have a minority group of individuals who, having realized those possibilities, avail themselves of the advantages the instrument has to offer; and in whose hands necessarily lies the responsibility for telling others about the advantages which they, themselves, enjoy.

Outside our own circles, no such distinction is made. Esperanto is judged by the actions of Esperantists. If the Esperantists are silent and inactive, we can have no reason to expect others to have a favorable opinion of Esperanto, whether they are editors of important magazines or officials of the U. S. State Department.

Atentul

Nia movado ne estas politika afero. Niaj celoj estas: instigi aliajn lerni la lingvon, instrui tiujn, kiuj volas lerni, kaj helpi al ili en praktika uzado de la lingvo.

Tamen, malgraŭ niaj plej streĉaj laboroj, ni povas prezenti la lingvon nur al tre malmultaj homoj. Esperanto, kiel internacia lingvo uzata de kelkmil homoj en diversaj landoj, utilas al tiuj kelkmil. Sed la lingvo ne povos plenumi sian destinitan funkciojn kiel servanto al la homaro ĝis ĝi estos universala lingvo komprenata de ĉiuj homoj.

Pro tio, 895,342 homoj subskribis la peton al UNO, ke oni instruu Esperanton en la lernejoj de ĉiuj landoj. Nur tiel la homaro ĝuos la benon de tutmonda interkomprenado.

Ĉela Ĝenerala Konferenco de Unesko dum la venonta aŭtuno, la sinteno de la Usona registaro povos esti decida.

Skribu multnombre al la Prezidanto kaj al Sekretario Dulles. Instigu ĉiujn gekonatojn, ke ili subskribu la Deklaracion pri subteno al Esperanto. En ĉi tiu gazeto vi trovos ekzempleron de la Deklaracio. Petu pluajn ĉe Sekretario Dormont, aŭ ĉe S-ano Glenn Turner, kiuj sendos senpage.

Ni ĵus eksciis pri la morto de malnova s-ano, John Joseph Sussmouth, kiu forpasis la 14-an de aprilo, 1951, en Milford, Conn. S-ro Sussmouth naskiĝis la 13an de marto, 1883, en Oberaltstadt, tiam en Aŭstrujo, nun en Ĉekoslovakujo. Li estis Esperantisto de 1899, kaj estis aktiva en pluraj landoj, aŭtoro de libroj kaj artikoloj en kaj pri Esperanto, kaj gvidis la movadon en Norda Ameriko dum pluraj jaroj.

Ni sciigas la morton ankaŭ de S-ano Edward Ayling, de San Francisco, je la aĝo de 71 jaroj. Dum la lastaj du jaroj li estis aktiva en la grupo en San Francisco.

Al la parencoj de ambaŭ ni esprimas nian profundan kondolencan.

Esperanto in the N. Amer. Press

The Los Angeles Times published, on Oct. 18, the story of Edward Kalmar (See story on page 3).

The Portland Oregonian for Nov. 29 mentioned Esperanto as one of the languages spoken by Air France guides in an article on world travel by staff writer Phyllis Lauritz.

Today's Speech, Oct. 1953, printed an article by Mark Starr on "Speech Problems in Labor-Management Relations". Mr. Starr advocates more widespread use of Esperanto by labor unions "to overcome the barriers of lingual diversity".

The Capital Times of Nov. 4 included a detailed report of Glenn Turner's current class in Madison, Wis., and featured a large picture of S-ano Turner.

The Imboden Journal of Imboden, Ark., published on Nov. 12 a letter from James D. Sayers in which much pertinent information regarding the Esperanto movement was included.

An article in *The Liberal* for December mentions Esperanto and the petition on its behalf which is due to be considered by UNESCO at its General Conference late this year.

The November issue of *Humanist World Digest* carried a letter to the editor from a reader in Great Britain in which Esperanto is called to the attention of Humanist World fellowship members.

A "Happy New Year" greeting in Esperanto was published on Jan. 1 by many newspapers around the country as part of a New Year's day feature by artist George Searbo.

Kiu havas ekzempleron de la libro "Parnasa Gvidlibro" kaj konsentos ĝin vendi estas petata komuniki kun la redaktoro de ĉi tiu gazeto.

numero de la Revuo vi
eron de la klariga folio
Glance". La folio estas
iltekmista propagandilo.
or 200 al F.R. Carlson,
Seattle 3, Wash. Se vi
aŭ la teksto pri libretoj
por komencantoj, li presos (sen kroma
kosto) adreson de via grupo, reklaman
pri hejmsfuda lernlibro kaj La Praktiko,
aŭ lasos tiun spacon blanka.

